# La Hodiaŭa Ĵurnalo

2017-12-06 n-ro 377

# Somalio: la nombro de la viktimoj de la plej mortiga atako atenco atingas 512 mortintojn



Ĝenerala vicsekretario de UN pri politikaj aferoj vizitos KDPR

Sesio de Media Asembleo de UN fokusiĝas pri regado de poluado

Fizikaj ekzercoj influas ne sole la muskolan strukturon

**La Hodiaŭa Ĵurnalo**

Ĉiutaga publikaĵo kun novaĵoj, aktualaĵoj kaj diversaĵoj – pri la mondo, scienco, socia vivo kaj Esperantujo.

**Misio**
Prezenti interesajn ĉiutagajn publikaĵojn por oportuna legado

Redaktoro
kaj grafikisto: Rafael S. Lima
Revizianto: Andrej A. Peĉënkin [Андрей А. Печёнкин]

**Kontakto**
hodiauajurnalo@gmail.com

*Sendu viajn aktualajn novaĵojn, en Esperanto, kaj vi verŝajne trovos ilin en la ĵurnalo.*

La redakcio ne nepre subtenas iujn enhavojn aŭ samopinias kun ties aŭtoroj.

*Elŝutu la dosieron, la fontoj, la ligiloj kaj la enhavlisto estas alklakeblaj.*

Farita per: Scribus

## Somalio: la nombro de la viktimoj de la plej mortiga atako atenco atingas 512 mortintojn
*Ses semajnoj post la atako atenco en Mogadiŝo p. 03*

## Ĝenerala vicsekretario de UN pri politikaj aferoj vizitos KDPR
*Jeffrey Feltman, ĝenerala vicsekretario de la UN pri politikaj aferoj vizitos KDPR p. 04*

## Sesio de Media Asembleo de UN fokusiĝas pri regado de poluado
*Kun la temo Cele al Senpolua Planedo p. 04*

## Ĉe flughaveno, 200 vivaj blatoj estis trovitaj en valizo de ĉina paro
*La agentoj de doganejo surpriziĝis antaŭ valizo p.. 05*

## Hodiaŭe
*Termofonto p. 05*

## Ni kune "plantu" energi-fonton - Ĉinio jam sin pretigis por tio
*Renovigebla energio p. 06*

## Fizikaj ekzercoj influas ne sole la muskolan strukturon
*Sesioj de intensaj ekzercoj povas avantaĝe influi la memorkapablon p. 07*

## Religioj en Braziljo
*Brazilo estis kaj ankoraŭ estas la plej granda katolika lando en la mondo p. 08*

# Somalio: la nombro de la viktimoj de la plej mortiga atako atenco atingas 512 mortintojn

Ses semajnojn post la atako en Mogadiŝo, la somaliaj aŭtoritatoj prezentis sabate la 2-an de decembro, novan informon pri la senprecedenca nombro de viktimoj. La eksplodo de kamiono meze de la ĉefurbo, pasintan 17-an de oktobro mortigis ĝis 512 homojn. Preskaŭ 300 vunditoj plu bezonas helpon. Neniu surprenis respondecon prila atako, sed oni suspektas la organizaĵon *Al Ŝabab*.



Pli ol monaton kaj duonon post la atako, kiu skuis la urbon, plejparte el la vunditoj forlasis la malsanulejojn en Mogadiŝo, sed tio ne signifas, ke ĉiuj resaniĝis. La plej gravaj kazoj estis senditaj eksterlanden por ricevi flegadon, kaj ili plu estas tie hodiaŭ, kiel eksplikas kuracisto de la malsanulejo *Kalkaal*:

«Kelkaj vunditoj estis senditaj al aliaj landoj kiel Turkio, Sudano, ĉar ili bezonas kirurgian operacion; iu troviĝas nun en Sirio. En Somalio, ni ne havas rimedojn por efektivigi tian altnivelan kirurgian intervenon, la vunditoj do estis prenitaj aliloken», li diris.

Kaj kompreneble, en tia situacio, nevideblaj vundoj ekzistas. Vundoj, de kiuj Somalio ankaŭ ne saniĝis.

La doktoro Amin estras societon de privataj ambulancoj, unu el la unuaj, kiuj mobiliziĝis dum la tago de la atako. «Por trakti la traŭmaton, necesas paroli dum la konsultiĝoj, sed en nia lando, nenia psikologia subteno ekzistas. Ankaŭ ni, ambulancistoj, suferas koŝmarojn. Ĉar ni ĉeestis tion, kion la aliaj ne vidis, dum tiu tago», li memorigas.

La materia helpo, tamen, alvenis. La familioj de la viktimoj antaŭnelonge ricevis po 900 ĝis 3 000 dolarojn, helpe por ke ili superula konsekvencojn de tiu atako.

Neniam Milito Inter Ni

# Ĝenerala vicsekretario de UN pri politikaj aferoj vizitos KDPR

Unuiĝintaj Nacioj diris lunde [04 dec 2017], ke Jeffrey FELTMAN, ĝenerala vicsekretario de UN pri politikaj aferoj, vizitos Korean Demokratian Popolan Respublikon (KDPR) de mardo ĝis vendredo [05-08 dec 2017].




Stephane DUJARRIC, proparolanto de Ĝenerala Sekretario de la UN, António GUTERRES, diris en ĉiutaga gazetara konferenco, ke FELTMAN renkontiĝos kun oficialuloj de KDPR por pridiskuti demandojn pri reciproka intereso kaj zorgo. Li renkontiĝos ankaŭ kun la landa teamo de la UN kaj membroj de la diplomatia misio, kaj ankaŭ vizitos la ejojn de projektoj de UN.

DUJARRIC diris, ke la vizito estis proponita unue en septembro, sed fine estis konfirmita en la 30a de novembro.

Yu
Ĉina Radio Internacia

---

# Sesio de Media Asembleo de UN fokusiĝas pri regado de poluado

Lunde [04 dec 2017] en la stabejo de Mediprogramo de Unuiĝintaj Nacioj en la Kenja ĉefurbo Najrobio malfermiĝis la 3-a Sesio de la Media Asembleo de la UN. Pli ol 4 000 gvidaj figuroj de politikaj kaj komercaj rondoj kaj reprezentantoj de ne-registaraj institucioj el la tuta mondo diskutos pri rimedoj kontraŭ poluado en la 3-taga kunevno.




La sesio kun la temo *Cele al Senpolua Planedo* celas unuiĝi kun fortoj de registaroj, entreprenoj, civila socio kaj individuoj kaj agadi kontraŭ ĉia poluado. En la kunveno estos adoptita serio de rezolucioj por trakti defiojn al la sano de la medio.

Kostarika Ministro pri Medio kaj Energio Edgar GUTIERREZ, prezidanto de la sesio, diris, ke la komuna celo de la internacia komunumo devas preni efikajn rimedojn por redukti poluon. Li aldonis, ke la homaro povas fari la teron pli pura kaj savi sennombrajn vivojn, nur se ni komencu fortan kolektivan agadon.

Yu
Ĉina Radio Internacia

# Ĉe flughaveno, 200 vivaj blatoj estis trovitaj en valizo de ĉina paro

Laŭ la ĉina gazeto "*Beijing Youth Daily*" [北京青年报 běijìng qīngnián bào], la 25-an de novembro en la internacia flughaveno de *Baiyun* 广州白云国际机场 Guǎngzhōu Báiyún Guójì Jīchǎng] de la urbo Kantono (Ĉinlando) la agentoj de doganejo surpriziĝis antaŭ valizo ĉar ĝi estis enhavanta 200 vivajn blatojn.




La oficistoj rimarkis strangan movadon ĉe la valizo de maljuna paro, dum bildigo de ĝia interno per la iksoradia aparato.

Demandite pri la kialo, ke ili estis alportantaj blatojn, la edzo asertis, ke tiuj insektoj povas esti miksitaj kun ŝmiraĵo por apliki ĝin sur la haŭto de lia edzino. Laŭ iu oficistino, temas pri antikva populara kuracilo.

Ĉar la ĉina aertransporta regularo ne permesas alportadon de vivaj bestoj per manportebla valizo, la maljunuloj decidis lasi la blatojn ĉe zorgado de la oficistoj.

Paulo Cesar Pires
esperanto.blog



# Bildo de la tago

**Termofonto (96 °C) en la Nacia Parko *Yellowstone* (Usono).**

**Vikipedio**

# Ni kune "plantu" energi-fonton - Ĉinio jam sin pretigis por tio

Ĉiuj scias, ke la tri ĉefaj fosiliaj brulaĵoj (karbo, nafto kaj naturgaso) havas nur limigitan rezervokvanton, kiu cetere ne estas renovigebla. Ili krome poluas nian medion. Do, sciencistoj klopodas por trovi alternativon, kaj ilian atenton kaptas plantoj kiuj estas utiligeblaj kiel fonto de energio.



Sur la terglobo sin trovas multe da plantoj utiligeblaj kiel energi-fonto. Ili ĉefe estas agrikulturaj produktaĵoj, organikaj restaĵoj, arbaro, restaĵoj de forst-industrio kaj ankaŭ algoj kaj akvaj plantoj. La Ĉina Akademio de Forstumado faris multe da eksperimentoj kaj jam trovis pli ol 60 specojn de tiaj plantoj en Ĉinio.

Plantoj utiligeblaj kiel energi-fonto kutime distribuiĝas vaste. Ili povas esti utiligataj kiel renovigebla energio. Se homoj povos planti ilin laŭ lokaj kondiĉoj, kaj transformi ilin en alternativon de nafto, tio estos pli facila ol ekspluatado de minejo kaj rafinado de prenita mineralo, kaj samtempe malmultigos la longdistancan transportadon per tubo aŭ aliaj manieroj inter rafinejo kaj industria regiono. Ankaŭ la kosto sekve malaltiĝos, kaj tio eventuale donos esperon por la daŭrigebla disvolviĝo de la homaro.

Fakuloj diras, ke sur la terglobo sin trovas pli ol mil specoj de plantoj kiuj riĉe entenas "nafton". Plejparto de ili ne rabas la teran resurson de grenoj kaj komercaj plantaĵoj. Tiel ili havas bonan perspektivon por disvolviĝo.

En la tropika arbaro de la provinco *Hainan* [海南省 Hǎinán Shěng] de Ĉinio, kreskas speciala arbo *Sindora glabra* [油楠 Yóunán], kiu normale altas de 10 ĝis 20 metrojn. El ĝia trunko foje elfluas flava aŭ bruna likvaĵo, kiu ŝajnas kiel dizeloleo. Lokanoj trovis, ke tiu likvaĵo povas esti uzata por brulaĵo de lumigilo, kaj eĉ rekte kiel dizeloleo de aŭtomobilo.

Algo estas planto kun simpla strukturo, malaltklasa en taksonomio kaj sufiĉe antikva. Malgraŭ ne tre alloga aspekto, multaj specoj de algoj povas produkti grandan kvanton da karbonhidrato, kiu post fermentigo povas fariĝi etanola fuelo. Plie estas mirinde, ke ili povas produkti "bio-nafton" por rafini benzinon, dizeloleon kaj aviadilan brulaĵon. La procezo estas facila, grandefika kaj ne poluas la aeron.

Oni antaŭkalkulas, ke sur same vasta terareo algo produktas pli multe da "petrolo" ol maizo, kiu nun estas la ĉefa materialo de bio-dizeloleo. Krome algo ne havas multajn postulojn pri la medio por kreskado, ili povas kreski en simpla lageto ĉe la angulo de kampo - ne kiel maizo kiu devas okupi la kampon. Estas pli grave, ke dum la kreskado algoj povas absorbi karbonan dioksidon ellasitan de elektrejo kaj tiel malmultigi forcejan gason en la aero.

Antaŭenpuŝite de "plantado" de energi-fonto la ĉina ekonomio sukcese transformiĝos, kaj tio ne nur helpos la releviĝon de la ĉina nacio, sed ankaŭ donos modelon de daŭrigebla disvolvado al aliaj evoluantaj landoj, ke ili transiru de ĉefe agrikultura civilizacio al ekologia civilizacio kaj evitu ripetadon de la nedaŭrigebla industria civilizacio. Ĉiuj evoluantaj landoj tiel kune povos prosperi efike protektante la medion. Tiam milito malaperos, kaj realiĝos paco!

Xie Ruifeng
El Popola Ĉinio



# Fizikaj ekzercoj influas ne sole la muskolan strukturon

Sciencistoj el *McMaster* University estas konvinkitaj, ke la fizikaj ekzercoj ne sole influas la muskolstrukturon de la homo, sed ankaŭ lertigas lian/ŝian memorkapablon, ebligas batali kontraŭ demencon kaj la sekvojn de *Alzheimer*-malsano. Tiel la listo de la salubraj efikoj de la fizika ekzercado vastiĝis.

Raportis pri tio "*Journal of Cognitive Neuroscience*". La eksperimenton partoprenis 95 junaj, sanaj volontuloj apartigitaj en tri grupojn. Personoj el la unua grupo dum 6 semajnoj partoprenis intensajn fizikajn ekzercojn, tiuj el la dua ligis fizikajn ekzercojn kun trejnado de kognokapabloj. En la tria, kontrola grupo de volontuloj praktikis sidan vivstilon kaj frontis neniujn mensajn ekzercojn. Ĉiuj partoprenintoj estis ekzamenitaj antaŭ kaj post la fino de la eksperimento. La esplorrezultoj elmontris, ke same la fizikaj ekzercoj kiel la kombino de la fizikaj ekzercoj kun la mensa trejnado fajnigis la memorkapablon. En la kontrola grupo estis rimarkitaj neniuj ŝanĝoj.

Tio sugestas, ke ĉiutagaj, eĉ mallongaj (20-minutaj) sesioj de intensaj ekzercoj povas avantaĝe influi la memorkapablon. Tio estas des pli interesa, ke videblan rezulton eblis atingi en relative mallonga periodo.

Pola Retradio

# Religioj en Braziljo

Kiam mi volis skribi pri “Religioj en Braziljo”, mi rigardis unue la vikipediajn artikolojn pri “Religioj en Brazilo” kaj “Religioj en Germanio”. Tiu lasta artikolo ege surprizis min: en ĝi troviĝas listo kun pli ol cent (!) religioj, sektoj kaj aliaj spiritaj movadoj. Preskaŭ dudek el ili havas nur malpli ol mil membrojn. La Katolika eklezio estas je la unua loko, kun 28,5% de la loĝantaro, la Evangelia (al kiu apartenas ĉirkaŭ 20 diversaj protestantaj eklezioj) je la dua, kun 26,5%. La trian lokon okupas la sunaistoj (3,2%) – pro tio, ke vivas multaj enmigrintoj en Germanio. Sed la plejmultaj enloĝantoj en tiu lando deklaris sin senreligiaj (ĉirkaŭ 35%).



Male Brazilo estas “pli religia” lando. En 2016 nur 14% de la loĝantaro deklaris sin sen religio. Fakte Brazilo estis kaj ankoraŭ estas la plej granda katolika lando en la mondo, t.e. la lando en kiu vivis kaj vivas la plej granda nombro de katolikoj (nun ĉirkaŭ 110 milionoj, 50% de la loĝantaro). Sed la nombro de evangelianoj daŭre kreskas, kaj ili estas nun 29% de la enloĝantoj. Antaŭaj datumoj: en 1994 75% estis katolikoj, 14% evangelianoj; en 2010: katolikoj – 63%; evangelianoj – 24%. Menciindas, ke ekzistas multaj diversaj sektoj aŭ branĉoj inter la evangelianoj.

Rilate al nombroj, spiritismo (precipe tiu kreita en Francio de Allan Kardec) troviĝas je la tria loko, kun ĉirkaŭ 2 procentoj.

Grava fakto en Brazilo estas, ke ĉi-tie vivis unue la indianoj, kaj poste estis alvenigitaj multaj afrikanoj kiel sklavoj. La indianoj havis siajn religiajn tradiciojn, kaj la afrikanoj kunportis siajn proprajn religiojn. Pro tio ekzistas ankoraŭ specoj de tiaj religioj en Brazilo; pli ekzakte oni parolas pri religia sinkretismo en ĉi-tiu lando.

Kiel mi diris, ekzemple en Germanio ekzistas pli ol cent spiritaj movadoj (inkluzive de religioj). Tamen evidente ili ne troviĝas en ĉiuj urboj. Eble oni trovas grandan parton en la grandaj urboj, sed kion fari, se, loĝante en urbeto, oni apartenas al spirita movado, kiu ne havas preĝejon, templon aŭ almenaŭ grupon en tiu loko? Tio estas malagrabla situacio, eble eĉ danĝera, ĉar en multaj lokoj bedaŭrinde ekzistas ankoraŭ maltoleremo, inter alie – aŭ aparte – religia.

Koncerne al la diferenco inter urbegoj kaj urbetoj la situacio en Brazilo estas simila (kvankam sendube la religia maltoleremo estas pli malgranda ol en multaj aliaj landoj), t.e. ke en la grandaj urboj oni povas aparteni al unu (aŭ pli) el multaj diversaj spiritaj movadoj.

La ĉefurbo Braziljo – aŭ pli ekzakte la tiel nomata Federacia Distrikto – ne estas tiel granda (kun ĉirkaŭ 3 milionoj da enloĝantoj), sed en ĝi estas aparte granda la nombro de spiritaj movadoj.

Antaŭ kelka tempo titolo de gazeta artikolo diris: “La diverseco de temploj kaj kredoj metas la Federacian Distrikton sur la itineron de la religia turismo”. Religia turismo? Kio estas tio? Evidente tio signifas unue, ke, kiel en la tuta mondo, turistoj ŝatas viziti belajn preĝejojn (templojn, moskeojn, sinagogojn k.s.). Due la aŭtoro de la artikolo volas diri, ke en Braziljo (kaj la aliaj partoj de la Federacia Distrikto) interesiĝantoj kaj scivolemuloj povas viziti grupojn de multaj diversaj spiritaj movadoj. Li/Ŝi ankaŭ asertas, ke ekzistas ĉi-tie (ĉi-tie – ĉar mi loĝas en Braziljo) ĉirkaŭ 800 temploj kaj mencias kelkajn el la movadoj. Per “templo” li/ŝi sendube volas diri “diverstipa loko” en kiu la membroj de tiaj movadoj kunvenas.

Herbert A. Welker
Esperanta Retradio